

Fajrero_{n-ro} 5-6

ESPERANTO-FAKO DE ZK ROH "TŘINECKÉ ŽELEZÁRNY"

FAJRERON EN ĈIES KORON!

Ĝuste antaŭ tri jaroj komenciĝis la vojo de "Fajrero", en aprilo 1959, post longa luktado pri ĝia hejm aparteno al la Uzinklubo en VŽKG. Malgraŭ ĉies favoro en la Uzina Klubo oni fine klinis la glavon antaŭ la nea verdikto de uzina presejestro. "Fajrero" fariĝis frata al la semajna ĉeĥlingva uzina gazeto "Jiskra" (Fajrero) en VŽKG Ostrava nur laŭ sia titolo. La hegemonion de nordmoravia inform-centro de esperantistoj grupiĝintaj en kultur-organizaĵoj sindikataj kaj komunumaj transprenis Esperantista Rondeto ĉe la Uzinklubo de "Třinecké železářny VŘSR" en Třinec, akceptinte la honoran taskon zorgi pri "Fajrero".

Nun, post tri jaroj, ni anoncas ĉesigon de la eldona agado. Ni faras tion kun bedaŭro, sed post prikonsidero de la situacio kaj en Třinec kaj en Ostrava kaj kelkaj aliaj lokoj de la Nordmoravia Regiono. La krizon de la kunlabora rondo de "Fajrero" kaŭzis precipe la disiro de ĝiaj membroj, manko de spertoj ĉe novaj adeptoj kaj cirkonatancoj malfavoraj por altigo de la teknika kaj grafika flankoj de la bulteno. Finfine tiuj ĉi cirkonstancoj markis jam plurajn numerojn en la jaroj 1960-61. Per tiu ĉi ekspliko ni volas montri, ke la malapero de "Fajrero", eble ne porĉiama, ne fontas el onidira krizo de la Esperanto-movado en ĈSSR, sed el specifa krizo elvokita per foriro kaj en unu kazo per malsaniĝo de la personoj, kiuj en Třinec kaj Ostrava solaj garantiis la Fajrero-aperadon.

Same kiel iama "Tagiĝo", ankaŭ "Fajrero" havis tre ampleksan taskon: informi, instrui, gvidi en intencoj de niaj superaj kultur-organoj, eduki aktivulojn, novajn talentojn, liveri materialojn por kunven-programoj de la rondetoj, esti libera tribunio de la membroj k.a. Tio entute estis tasko malfacila kaj nur modeste ni povis servi. Tamen stoko da leteroj el dum tri jaroj, kiujn sendis al ni la legantoj, pruvas, ke ni plenumadis la taskon, ke ni fatis ĝin kun elano responda al juna kaj nova generacio. Al ni estis fremda ĉiu artifiko kaj malplena frazismo same kiel izola klubismo. La laboron ni faris honore kaj kun profunda ŝato. Sufiĉe amatore, tion pardonu al ni, sed kun fajrero en la koro.

En la lasta jaro pliboniĝis la eldon-stato de esperantaĵoj en nia lando. La Ĉeĥoslovaka Esperanto--Komitato en Praha dissendas periode sian bultenon "Zprávy ČSEV", la kontaktoj inter lokaj grupoj pliboniĝis ankaŭ danke al la tutŝtataj seminarioj de funkciuloj. Ni supozas, ke ĉiu konsentas kun ni, ke hodiaŭ jam ne estas nepre necese posedi bultenon, kia estis nia "Fajrero".

Al ĉiuj legantoj ni rekomendas regule partopreni laboron de lokaj rondetoj, kie ili trovos ĉiuf flankan subtenon por kreski kaj kiel esperantistoj kaj kiel civitanoj de la socialisma ŝtato. Al ĉiuj ni rekomendas jam nun mendi por la j. 1963 ĉe Orbis, Praha, atingeblajn periodaĵojn en Esperanto: Nuntempa Bulgario, El Popola Ĉinio, Vietnamio Antaŭenmarŝas, La Hungara Vivo, Pola esperantisto k.a.

Se vi deziros ankoraŭ reveni al la temo pri "Fajrero", pri ĝia paseo aŭ renasko, bonvolu adresi viajn pensojn al iu el la ĝisnunaj gvidantaj personoj en la kunlabora rondo: Jan Pomykacz, Třinec II, Podlesí 171; Inĝ. Vlastimil Kočvara, Opava, Gogolova 28; Inĝ. Jan Werner, Košice, Sídlisto Mier-blok BH/5 aŭ al la Esperanto-Rondeto, ZK ROH Třineckých železáren VŘSR, Třinec, ĈSSR.

Fine ni esprimas nian dankon al ĉiu, kiu per kia ajn helpo, inkluzive de financa kontribuo, partoprenis en nia laboro por la paco, por la interkompreniĝo, por la progreso.

Esp. Rondeto TŽ VŘSR

Jan Neruda:

HELGOLANDA ROMANCO

Pelegas ŝipon ŝtormo en rabio.

Al roko trompan lampon fiksitis John:

"La bordon benu Dio!"

La ŝipo sage al la lum' impetas,

Je rifo renversiĝas, kaj la mast'

En sablon sin pikĵetas.

"Filino mia edziniĝon festos",

Ĝojkrias John, dum siblas ŝaŭmo. "Jen

Por ŝi nun doto estos!"

Kaj lia barko kiel vulp' sin puŝas

Ĝis tie, kie kvazaŭ nigra ĉerk'

La ŝip' rompita kuŝas.

Ne volas tempon perdi John; li svingas

Hakilon bate, sed el sube voĉ'

Subite lin atingas.

"Rapidu", sonas la obtuza tono,

"Ricevos vi duonon de la var',

Duonon de la mono."

Kaj John aŭskultas kun grimac' malpia -

"Fariĝos mia ne nur unu part',

Sed ankaŭ la alia!"

Alborde celas lia bark' en fuĝo.

Li nokte ne revenis al la ŝip',

Nur ĉe la matenruĝo.

Per la hakil' la ŝipon frumatene

Li reatakas. Voĉ' nenia nun
Aŭdiĝas plu el ene.

Kadavron la unuan jam senbride
Eligas akva ŝpuco tra la tru';
Ĝin kaptas John avide.

Sed tuj konsternan fakton li malbenas:
"Pri l' geedziĝo eks! - jen mortan ja
Mi la bofilon tenas... "

El la ĉeĥa trad. M. Lukáš.

NATURVIZIOJ

O. Kníchal

1.

Nubeta ĉielo vidiĝas ĉie ĉirkaŭ Montsuproj kaŝe elrigardas de sub laktonebulo. Ronde vagas la suno, kiel lampiro fluoreskas tra la densaĵo. Irvojeto leviĝe serpentumas antaŭen. Ĝin laŭlonge borderas rokoj, kvazaŭ monstraro, kreitaj de nevidebla skulptisto. Aliflanke abio staras sinsekve, aŭ kaŭras branĉ-al-tere apud dise kuŝantaj arbotrunkoj. Malsupra torento sonigas valon, muĝas, fanfaronas per la ŝaŭma bolo. Eĉ unu bildero ne vakas, ĉio samcelas reciproke. Pentrinda vidaĵ'! Epokoj metis ĉi enhavriĉan galerion je l' dispono al la du disipaj geedzoj — Iliaj Vento kaj Pluvo-Moŝtoj. Bonvola admiranto, estu singardema, ĉar la enirpago varias laŭ gusto de la luantino.

2.

Antaŭ multaj jaroj kovris tiun mirindan sanktejon praarbaregoj, abundaj je multnombra bestaro. Ili entenis plurajn danĝerojn diversloke. De tago al tago la homa areto konforme al siaj bezonoj aliigas la vivmedion. Mildigias la regiono, kelkfoje ĝi devas cedi senrevene, kvankam la malfavoraj cirkonstancoj ne ĉesas minaci fruktojn de la celkonscia laboro. Longedaŭraj ŝanĝoj ĝustatempe montriĝis sur ciferplato de la historio.

La mezepoko vekis grandan intereson pri ĉi tiu forgesita mondangulo. Alvenas aviduloj pelataj de orfebulo. Kun paŝtistoj hejmiĝas fiŝistoj kaj karbistoj. Poste okazas la unuaj vizitoj al montaro. Estis edzino de iu kastelestro, kiu entreprenis la ekskurson. Sugesta beleco de la montaro impresis! Gloraj sciencistoj ekvojaĝis por serioze esplori la natur-dotejon. Germanoj, angloj, francoj, svedoj kaj la aliaj ĉeestis. Aperis respektindaj libroj ĉe famaj aŭtoroj. Ili diskonigis tra la mondo la neĝpintan frataron. La regiono famiĝis, unike prezentiĝis kurackapablo de arbar-plantoj, ĉio en buntaj koloroj kaj trajtoj gravuritaj en paso de jarmiloj.

3.

Subtera mondo. Hindaj palacoj, konfuza loĝejaro. Formika agado de pratempo. Akvo obstine gravuris interne de la kaverno, traboris kaj subrampis dikajn murojn,

postlasante belstaturajn fantaziaĵojn. "Mi paciencis pli ol milionon da jaroj. Nun oni gapas - fia ĵaluzo! Mi estas denaske en krea tensio, ĉasta – nune nur senvualiĝis miaj misteroj; eĉ pli multaj venos por rigardo. Kion vi volaas? Jen senflua akvofalo, la plej malnova. Grizverdaj lagetoj proksime, la diabla buŝego kaj baraĵoj. "Krutaj glitebenoj respegulas enan lumon, kies brilpotenco perdiĝas en abismaj nigrujoj. Eta ŝton-simio rikanas ĉe la pordo. Solece, pripense ludas sian ludon ludistoj ĉiamaj – gutoj. Kvazaŭ plorus la profundoj plaŭde: unu, du, tri, kvar...

4.

Oni dekapigu ĉapeton, ĉar ludestras silento. Kalvaj ŝtonoj portas nomojn de pluraj bravaj natur-amantoj, kiuj sekvis ties sorton. Iam perfida apogo.... la ŝtono en falo akompanata per korŝira mortkrio, kiu sin rompas en profundoj. Alifoje neĝblovado ekfuriozas kaj surprizas montaranon. Majeste ili mortis proksime al la ĉielvolbo. Simbola tombigo. Ĝi estas komuna ripozejo. Juna inĝeniero, studentoj el apudlando, sciencisto-biologo. Ĉu ilin ne amkaresis la rigardoj de la patrimo, edzino, parencoj? Ĉu ne sonis admona ties voĉo, ol venis la plej terura averto?

Kun klinita kapo ni kvietas mergiĝe. Grizaj nub-ogroj kaj noktvualo forviŝas larmojn. Fataldestinaj pensoj trudas senton de mutdoloro. Ĉio devas malestigi en kruela araneaĵo de la morto. Netuŝitaj flanke de la mondo flagras la imagoj en memoro. Kion vi serĉas? Malantaŭ tiuj krucoj etendiĝas nur mallumo. Flustras freŝdona venteto, al cervino premiĝas la ido, kontente gvatas leporparo el la rifuĝejo.

Kiam la vanta aŭtuno per foliaro superŝutos la tombejon, tempesto taŭzos aeron forte batante kontraŭ skeletaj arboj. Poste la ĉielo sendos pluvakompanion, nesubite, heziteme. De tombo al tombo flugos ĝemkanta melodio.

5.

Varmega tago. Preskaŭ senkonscia, laca irado. Mi tede rigardas mekanikajn paŝojn, malprecizajn movojn de korpoj. Malantaŭe iu forte anhelas. Piedoj plektiĝas sur premata herbo, ankaŭ la okuloj laciĝas. La blindiga sunlumo fikse turmentas niajn dorsojn. Mi deziras rompi tiun ĉi unisonon. Sed kien devojigi? La vojflankoj memorigas min pri sangavidaj pikemuloj, jen malamike zumantaj, jen pretaj piki kaj suĉi. Ŝajnas, ke la suno nin katenis kaj gvidas kiel krimulojn al sia orbrila kastelo. Gardataj de l' arbara armeo ni marŝas supren. Hi, hi ridas linkoj. Eĉ sciuro forpelas nian trankvilon. Nu, pripensu, gesinjoroj, ĉu ne estus pli oportune sidi hejme en brakseĝo kaj balanci per la kapo? Oni demetas ĉemizojn pro ŝvitego. La celo videble proksimiĝas. Sed venas dikvanga ĉielvagabondo kaj vokas: "Sidiĝu terglobanoj, mi tuj preparos ion por manĝo. Ĉu vi ŝatas oksigenon? Krake frakasiĝos por vi mia trunko, mia karno fulmofajrera, por vi, por via satigo, ha, ha..." En freneza danco ni kuras-iras fronte al la tondro. Jupiteraj pafoj trafulmas nubojn, kiuj disiĝas tuboforme. Subita krepuskiĝo malhelpas la iron kaj orientiĝon.

Malhela bluo kaj facila frostoporta blovo ĉe mia vizaĝo. Mi kuras. Kio okazis? La nokto rekonsciigas min... Ie supre naĝas la rideta Luno. Evidente vi forigis vian konkuranton, ĉu? Ĉarma fraŭlo! Mj vidas, ke lin ĉirkauas senfina steletar'.

Altaj Tatroj - VII/57

Hilda Dresen:
ESTIS LA AMO NUR VORTO

Estis la amo nur vorto,
vorto neniondira,-
igis senchava ĝin sorto
al la anim' sopira.

Estis la am' nur fabelo
dum infanec' legita,
igis realo kaj vero
ĝin via ven' subita.

Via alveno forskuis
la letargion vintran,
kvazaŭ printempo influis
koron ĝis nun dormintan.

Josef Cink:

"Per praktika uzo de Esperanto ni faros la plej bonan poresperantan laboron kaj propagandon. Ni montros la utilecon de Esperanto kaj tiel povas esti forigata la perforta, onidira kaj bombasta propagando, al kiu fidas neniu. Ni devas fari el Esperanto lingvon, kiun oni povas lerni aŭ nelerni, sed neniel diskuti pri ĝia ekzisto, faktoron, kun kiu oni devas kalkuli. Ni estigu tian situacion, ke la homoj mem venadu al ni kun peto kaj demando, kie povus lerni tiun lingvon. Ni ne entrudiĝu. Esperanto ne regu nin, sed ĝi servu al ni. Por tio ĝi estis kreita." (Konkurso de Fajrero, II-3c/1960).

LINGVA ANGULETO LINGVA PRI SUFIKSOJ -IG- KAJ -IĜ.-.

-IG- ĝenerale signifas fari, lasi, kaŭzi tia. Kun VERBAJ radikoj ĝi signifas nek "igi -anta", nek "igi -ata", sed igi -i", tial sen kia ajn adapto ĝi povas servi kaj por senco pasiva kaj aktiva. Ekzemple: "Sciigi (sciantigi) amikon pri novaĵo" aŭ "Sciigi (sciatigi) novaĵon al amiko". Ambaŭ frazoj estas tute bonaj kaj klaraj kun la formo "sciigi". Komparu nun du verbojn:

1. Mi manĝas viandon.— Mi manĝigas mian katon.
2. Mi vendas vinon.— Mi vendigas vinon.

En la 1-a kazo "mi" estas subjekto, kiu efektive mem agas laŭ senco de la predikato. Tiu havas senco aktivan (manĝantigas).

En la dua kazo "mi" estass subjekto, kiu agas pere de iu alia. La predikato havas senco pasivan (vendatigas).

La resumo instras nin, ke la sufikso -ig- kun transitiva verba radiko en senco pasiva lasas al subjekto nur iniciaton, sed la agon plenumas iu alie, kiu estas eventuale klarigata en komplemento. Ekz.: "Mi bindigas librojn ĉe s-ro Kraus"; (la

librojn bindas por mi s-ro Kraus) — dáti vázati. "Mi skribigas la taskojn en la rondo de miaj amikoj"; (ne mi, sed la amikoj skribas la taskojn) — dáti napsati.

-IG- kan SUBSTANTIVA radiko signifas fari, kaŭzi tia: vaporigi (fari el io vaporon), edzigi, edzinigi (fari iun edzo, edzino) ktp. Ĉe substantivradikoj oni povas iam ellasi la sufikson: normi — normigi; limi - limigi; klasi - klasigi.

-IG- kun ADJEKTIVAJ radikoj signifas arnkaŭ kaŭzi tia: blankigi (fari blanka), afabligi - (fari afabla) ktp.

-IG- estas uzata ankaŭ kun PREPOZICIOJ:

sen, super, sub, en,... kaj kun kelkaj ADVERBOJ, ekz. pli, tro, for k.s.

En Lingva Respondo n-ro 14 D-ro Zamenhof aprobis ankaŭ formojn kun korelativa radiko "neni": neniigi, neniigi.

- - -

—IG- signifas ekesti tia, veni do en novan staton, ŝanĝi sin.

Kun VERBAJ radikoj ĝi povas havi sencon aktivan kaj pasivan kiel ĉe la sufikso -ig-. Sed unue ni komparu tri gradojn de volateco:

1. Pasivo - por montri agon nevolan, pasivan, kaŭzitan de iu alia. Ekz.: Ŝtono estas rulata.

2. Sufikso -iĝ- por montri agon nevolan, sed okazantan per si mem. Ekz.: Ŝtono ruliĝas. Vetero ŝanĝiĝas.

3. Refleksiva formo - por montri agon volan, konscian, ekz.: lavi sin, informi sin, certigi sin k.s.

-IG- kun verboradikoj netransitivaj estas ĉiam en aktiva senco kaj sciigas pri subjektaj statŝanĝoj, instinktaj, sen konscia volo, ekz.: dormiĝi, kuŝiĝi malsana, stariĝi konsternita k.s.

En praktiko oni vidas, ke uzado de tiuj ĉi formoj estas iam peko kontraŭ bona stilo. En multaj kazoj ili estas anstataŭindaj per la prefikso ek-, aŭ per refleksita formo: ekstari, kuŝigi sin...

La formoj "sidiĝi, sidiĝu!" estas jam tiom ofte uzataj, eĉ de bonaj aŭtoroj, ke ili ne povas esti rigardataj kiel eraroj.

Erara estas uzo de solstara vorto "iĝi" anstataŭ "ekesti". "Iĝi" ne signifas "aperi" aŭ "kreiĝi", sed nur "ekesti tia", ekzemple: Ekestis (estiĝis) kondiĉoj..., ne: Iĝis kondiĉoj...

Superflua estas meto de ek-iĝi al unu vorto, ĉar ambaŭ signifas komenciĝon de nova stato. Ekz.: eksidiĝi, ekpaliĝi... (estas nenatura pleonasmio).

Ĉe netransitivaj momentverboj ne povas okazi plia statŝanĝo, do -iĝ-sufikso estas ĉe ili nenatura: morti, fali, ĉesi k.s.

-IG- kun transitivaj verboradikoj stataj kaj procezaj povas akcepti la sencon aktivan kaj okaze ankaŭ pasivan, ekz.: Mi sciigis pri la novaĵo.- La novaĵo sciigis al mi. -- Mi kredigas pri tio.- Tio krediĝas al mi. Similaj verboj estas: koni, rakonti, ami, senti, pensi...

-IG- kun la ceteraj transitivaj verboradikoj ĉiam havas nur la sencon pasivan: iĝi -ata. Ekz.: aŭdiĝi, ruliĝi, portiĝi....

Kun SUBSTANTIVAJ kaj ADJEKTIVAJ radikoj: vaporigi (fariĝi, ekesti vaporo); edziĝi, edziniĝi (ekesti edzo, edzino); blankiĝi (ekesti blanka) ktp. Komparu:

1. Herbejo flavas de multaj floroj (konstanta stato)

2. Folioj flaviĝas aŭtune (ŝanĝo de la stato)

Sub influo de parola Esperanto konstantiĝis jenaj du formoj, kiuj ne konformas kun la severa logiko:

nomiĝi - havi nomon (ne: iĝi nomo),

troviĝi - trovi sin (ne: iĝi trovata).

Kompilis J. Werner.

PRI TRANSSKRIBO DE ZA NOMO DE PREZIDAMTO MAŬ.

La redakcio de "El Popola Ĉinio" en la n-ro -1/1962 respondas al s-ano J. V. Dolinský:

"Laŭ nia nova alfabeto ĝi estas skribata kiel Mao Zedong, sed en transskribado laŭ fonetikaj reguloj de Esp-o ĝi fariĝas Maŭ Zedong. La aliaj skribformoj estas aŭ neesperantaj aŭ antaŭe uzitaj. Nia nuna sistemo celas laŭeble uzi la esperantajn literojn obeante al la fonetikaj reguloj de Esp-o en la transkribado de la Han-lingva Fonetika Alfabeto aprobita de niaj Ŝtata Konsilo kaj la Nacia Popola Kongreso."

(fragmento)

Ĉeĥoslovaka Radio denove parolas en Esp-o.

Ekde februaro 1962 la fremdlingva disaŭdigo de Ĉs. Radio, fako por Aŭstrio, komencis elsendadi regule en Esperanto 6-minutan programon ĉiun lastan ĵaŭdon en monato, inter 18,45 kaj 19,00 h. (MET) sur la meza ondo 233,3 m (1.286 Kltz). 3.5.1962 - Pri Esperanto-literaturo; 28.6.1962 - Esperantistoj en Plzeň.

PRAGA 62 - nova Esperanto-poŝtmarko.

Post vico da ŝtatoj (Sovetunio, Brazilo, Aŭstrio, Bulgario, Pollando, Bulgario, Jugoslavio) Ĉeĥoslovakio ekhavis poŝtmarkon kun Esperanta teksto. "Tutmonda Ekspozicio de Poŝtmarkoj PRAGA 62" estas sur la 2-krona poŝtmarko kun bildo de altfornegoj en la metalurgia kombinumo en Ostrava-Kunčice. La ceteraj poŝtmarkoj de la serio surhavas la tekston en la lingvoj: angla, araba, ĉina, franca, germana, hispana, rusa kaj sveda. La ekspozicio okazos sub protekto de FIP de la 18.8. ĝis la 2.9.1962 en Prago.

"HEROLDO" en Ĉeĥoslovakio.

La redakcio de Heroldo de Esperanto disponigis 150 sendevizajn abonojn por nia lando laŭ interkonsento kun Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato. Ekde nun ni povas ankaŭ pagi anoncetojn por Heroldo per nialandaj valutoj. La Heroldon distribuas s-ano Jar. Šustr, delegito de UEA, Praha 1, Dlouhá 10. Prezo de la abono 50 Kĉs. Samtempe bulgaroj ricevis 60 kaj hungaroj 50 abonojn.

Nova ĉefredaktoro de tiu ai fama gazeto fariĝis polino, Ada Sikorska-Fighiera, kiu ĝis antaŭ nelonge estis okupita en Pola Radio en Varsovio.

NEŬTRALECO KAJ TOLEREMO.

N.R.Smith verkis artikolon pri neŭtraleco por "The British Esperantist" (represita en "Esperanto" marto 1962), kiun konvene kompletigas la artikolo "Neŭtraleco kaj toleremo" en "Heroldo de Esperanto" n-ro 7/192. Ni ĉitas:

"La verkinto konceptas la neŭtralan Esperanto-movadon kiel kunvenejo por "libera interŝanĝo de ideoj, libera renkontiĝo inter la plej diversaj rasoj, kredoj, politikoj". Do, ne pasiva sinfermo en ebura turo, sed utiligo de la internacia lingvo por pli efike kontakti tiujn problemojn el ĉiaj vidpunktoj. La kolektivo restas neŭtrala, ĉar ĝi ne elprenas oficialan pozicion, sed la individuo rajtas esti kaj manifesti sin malneŭtrala, kondiĉe, ke li respektu la limojn de toleremo." ... komprenemo estas la virto ne nur pasive toleri, sed ankaŭ senpasie prijuĝi la argumentojn de aliaj kaj aktive akcepti el ili ĉion, kio racie estas prava. Tiun sintenon oni nomas hodiaŭ libereco de dogmismo kaj antaŭjuĝoj ... oni devas zorgi eviti la trudon de siaj ideoj per iu ajn rimedo alia, ol simpla argumentado".

En la pensoj estas grava instruo ankaŭ por niaj propagandistoj de Esperanto. Ili ne forgesu, ke la novaj metodoj de propagando estas realismaj kaj objektivaj, allasenda estas diskuto kaj racia argumentado.

Red.

LA DANUSA INSULO ESPERANTO.

pli ol 40 jaro, proksime al la bulgara urbo Orjaĥovo, el la blua de la blua Danubo aperis sabla insulo, kiu iom post iom elkreskis kaj fariĝis alloga plaĝo, somere plena de amatoroj de akvosporto kaj de somerumantoj. La insulo portas nomon "Esperanto", ĉar la unuaj konkerantoj de la senmastra teritorio estis membroj de la loka societo "Dro Zamenhof", kiu la posedaĵon de la insulo kaj la nomon kontraktis kun la Urba Konsilantaro.

Laŭ B. Dimitrov en EPĈ 2/1962

LA UNIVERSALA KONGRESO 1963 EN SOFIA

La Estraro de UEA per skriba voĉdono decidis akcepti la inviton de Sofia, okazigi la U.K en la venonta jaro en tiu urbo.

Jam nun ni zorgu pri digna reprezento de ĉeĥoslovakaj esperantistoj!

UEA HAVAS NOVAN SIDEJON.

Nova adreso de la Centra Oficejo: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam 2, Nederlando.

SOVETAJ ĴURNALISTOJ FAVORAS AL ESPERANTO.

Kreskas la nombro de redakcioj, kiuj en siaj gazetoj kaj ĵurnaloj oferas sufiĉe da loko al Esperanto. Ĝenerale oni substrekas sukcesan ligadon de amikaj rilatoj kun la mondo. - Eksterordinan interesigon oni povas observi en kaŭkazaj, ĉebaltaj regionoj kaj en kelkaj ĵurnaloj de Federacia Rusujo. - Kreskas ankaŭ nombro de ĵurnalistoj-esperantistoj. Tutan grupon de ĵurnalistoj-esperantistoj havas redakcio de "Sadinskaja Pravda" kun la ĉefredaktoro Ivan Daurcev en la frunto.

NOVAJ ELDONAĴOJ EN BULGARIO.

En multnombra eldonkvanto aperis esperantlingve libro, enhavanta multajn el la referatoj de la I-a sekretario de la CK de Komunista Partio en Bulgario - Todor Ŝivkov. Ĝi estis favore recenzata eĉ en okcidentaj gazetoj, pro la altkvalita esperantigo.

Por informi eksterlandon pri la vidindaĵoj de Bulgario, oni jam eldonis broŝuron pri Sofio, multkolarajn prospektojn pri Varna kaj Oraj Sabloj. Por eldono estas preparataj pluaj prospektoj.

INFANOJ NE KONAS LIMOJN.

Sub tiu ĉi titolo aperis fine de la pasinta jaro en Pollando libro kun tekstoj kaj fotografiaĵoj pri infanoj de kvin kontinentoj. La libron verkis en Esperanto kvar aŭtoroj de diversaj nacioj.

ESPERANTO EN VARSOVIA ANTAŬLERNEJO

En Pollando vastiĝas instruado de Esperanto ne nur en lernejoj, sed ankaŭ en antaŭlernejoj. Instruado tie okazas helpe de ludoj, amuzoj kaj kantoj. Ĉe ifanoj oni observas pozitivan progresadon en la lingvo.

60 JAROJ DE EK BRNO

En decembro 1961 festis esperantistoj en Brno la 60-jaran jubileon de la Eklubo en Brno. La plej malnova en nia lando. Artisman programon muzikan partoprenis pli ol 400 personoj.

30 ESPERANTAJ LIBROJ DE UNU ELDONEJO

"STAPETO" en La Laguna sur Kanariaj Insuloj eldonis kiel s-ian 30-an eldonaĵon la dramon de Wiliam Shakespeare "OTELLO" en traduko de Reto Rossetti.

ALIĜU POR SET 1962 EN LANĈOV

Kiel en la jaroj antaŭaj, Somera Esperanta-Tendaro estas preparata apud la baraĵlago de Vranov, apud vilaĝo Lanĉov, en suda Moravio. La prospektojn, dissendas kaj aliĝojn akceptas:

Pavel Sittauer, Třebíč, Riegrova 62

Terminoj: 1-a etapo: 15.7.-28.7.1962

2-a etapo: 29.7.-11.8.1962

MENCIO PRI LA RICEVITAJ LIBROJ.

La libroj el Ĉinio kaj Vjetnamio estas aĉeteblaj en "KNIHA", Praha I, Václavské náměstí 42.

"KARPETOJ TRANSSALTIS LA DRAKPORDON" de Jang Ŝanzi kaj Ding Jonglin, teksto de Giu Giu, tradukis T.H., broŝurita, 32 pĝ., formato 20x18 cm, eldonis Ĉina Esperanto-Ligo, Pekino 1961.

Porinfana, ĉinstila fabelo ravigas per vere ĉinaj koloraj ilustraĵoj. Multaj bildetoj ne servas nur kiel akompano de la teksto, sed male, per sia maniero substrekas enhavon

kaj signifon de la teksto, kiu estas tre mallonga kaj konciza. La libreto estas facile legebla, kvankam enhavas eĉ vortesprimojn malpli oftajn. Kelkloke estas la vortesprimo por ni nekutima – verŝajne sekve de laŭvorta traduko el la ĉina lingvo) ekz.: ĝojante ekster si la karpetoj krias ...).

Aliel estas la teksto tre zorgeme kaj sen eraroj presita.

-vlk-

"FRANJO TU NAŬ" de Bui Duc Ai - rakonto pri fiŝista regiono en Sudvjetnamio dum okupado fare de Francoj (1945-1954), 194 ĝ, broŝurita, tradukis Ngung Ninh Kinh kaj Ngung Minh Tung.

"PRI POPOLDEMOKRATIA DIKTATURO" "INTERPAROLO KUN USONA ĴURNALISTINO ANNA LOUISE STRONG", "PRI PRAKTIKO" de Maŭ Zedong. Ĉiujn tri libretojn eldonis Ĉina Esperanto-Ligo en 1961. La verketoj de la ĉina politika eminentulo kontribuas la literaturon politikan en la tria, kiu estis verkita jam en j. 1937, la aŭtoro kritikis subjektivismajn erarojn de dogmatismo kaj empirismo el vidpunkto de marksisma teorio pri sciigo.

- Muzika Terminaro (M.C.Butler, F. Merrich);

- Terminaro pri infanludoj (S.B.E.T.);

--Radio-Terminaro (A.Venture);

- Kudra kaj Trika Terminaro (M.kaj V.Verda).

Ĉiujn ĉi terminarojn eldonis Esperanto Press, Oaklerville, Ontario, Kanado en 1961, broŝuritaj, samformataj, prezo 4 steloj.

ANONCETOJ.

- Dimiter Pavlov, ul. ARDA No 8, VRACA, Bulgario, 15-j. dez.kor. kun ĉs. lernantoj.

- Teknikum Górnictwa Odkrywkowego, KRAKÓW, ul. Rzemnictwa 4, Pollando, dez.kor. kun ĉs. ministoj.

- Esperatista junularo deziras korespondi kun gejunuloj de elektro-fabrikejoj (radio-televideo-telefono) pri faktemoj.- Skribu al ni amase kaj sendu materialon por ekspozicio.

Adreso: Esperanto Rondo "Zamenhof" Beloianniaz radio kaj telefono fabrikejo, Budapeŝto, Hungario.

HA HA HA HA HA HA HA HA HA HA HA HA

- Se la floroj de leontodo decidiĝus partopreni la biciklan konkuron Berlin-Praha-Warszawa, ili venkus. Havas flavan trikoton.

(K.Konrad)

- Kiom jam progresis la scienco! Kiaj mirindaj malkovroj! Flugoj al la luno, la suno... Kaj tamen ĝi ne kapablis ĝis hodiaŭ elpensi pilolojn aŭ pulvoron kontraŭ ratoj sur kampoj de la kulturo!

(K.Konrad).

- Programo de ne unu esperantista kunveno: malfermo: la prezidanto. Leciono: la prezidanto. Referato: la prezidanto. Diskuto: la prezidanto. Societa ludo: la

prezidanto. Kultura enmetaĵo: la prezidanto. Aplauĉdo: la prezidanto.

- A: Kial vi havas tiom da libroj dise sur la planko?

- B: Bibliotekon ĝis nun al mi neniuj pruntis.

(Rimarko: inter ili estas ofte eĉ libroj Esperantaj. Ĉu vi post tralego redonas ilin?)

- Okazis dum bicikla konkurso: Sole veturanta konkuranto vokis viron, kiu sidis antaŭ dometo apud la ŝoseo: "Ĉu la ceteraj estas proksime antaŭ mi?" – "Mi ne scias", respondis la viro, "ni loĝas ĉi tie nur unu semajnon."

- Ĉu povas esti aŭtuno en majo? Jes, kiam Fajrero vojeraras.

FAJRERO estas bulteno de E-junularo en Nordmoravia Regiono, Ĉeĥoslovakio. Aperas laŭbezone.
--

N-ro: 5-6/1961 - (aperas en majo 1962)
--

ELDONAS: ZK ROH Třinecké železářny VŘSR, esp. kroužek.
--

REDAKTAS: Jan Pomykacz, Jar. Novotný, Jan Werner (resp. por ĉi n-ro).

ADMIN.: Inĝ. Vl. Kočvara, Ostrava 8, Kamenec 251
--

p.k.n-ro T-03 - 22170